

Usona **Esperantisto**

Bulteno de Esperanto-USA - N° 2025:4

Feliĉan festosezonon al ĉiuj

Fotinto: David BECK

Anoncoj

p.3

Remembris por 2026! • Rezultoj de la 7-a Usona Bona Film-Festivalo • UEA invitas prelegi en IKU 2026 en Graco, Aŭstrio • Nekrologoj

Estrar-kunsidoj, Aŭg-Okt

p.8**de la estraro**

Resumo de estrar-kunsidoj de Aŭgusto ĝis Oktobro, 2025.

De la kasisto

p.9

2025 K3 Financa ĝisdatigo • Esplorante la lingvon de financoj, parto 4

Solve: *Senteme* el N^o 2025:3

p.14**enigmo-solvej**

Solve de la pasintnumera krucvortenigmo.

Krucvortenigmoj

p.15

Por fermi la jaron, jen du enigmoj je 7×7 ĉeloj.

Bildstrioj

p.16

Freŝaj strioj de *La vivo de Peĉjo* kaj de *Kaĉo sen ĉapelo*.

NOREK ege sukcesis en sia 44-a jaro

p.17**kongresaj raporto** • Izako ZAVIRUĤA

La 44-a Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco ekzemplis lokajn kulturaĵojn de Portlando, Oregono, kie ĝi okazis.

Frato

p.17**senintenc** **esperantaĵo** • Jeremy GENOVESE

Fratoj Frato kolektas rubon en Klevlando, Ohio.

Mikronoveloj

p.18

Du jarfinaj mikronoveloj.

Anoncoj

Remembriĝu por 2026!

Ĉu vi jam remembriĝis al Esperanto-USA por 2026? Se ne, ne forgesu fari! Simple iru al esperanto-usa.org kaj alklaku la verdan butonon supre kiu diras *Join or Renew*. Ni kuraĝigas vin elekti komunan membrecon por kaj Esperanto-USA kaj la Universala Esperanto-Asocio; tiel vi subtenos ne nur nian agadon, sed ankaŭ agadon je la internacia nivelo. Vi ankaŭ tiel restos informata per niaj regulaj retpoŝtanoncoj kaj plu ricevos tiun ĉi bultenon. Dankon pro via subteno!

Renew your membership for 2026!

Did you already renew your membership for Esperanto-USA for 2026? If not, don't forget! Just go to esperanto-usa.org and click the green button at the top that says *Join or Renew*. We encourage you to choose a Joint Membership for both Esperanto-USA and the Universal Esperanto Association; that way you'll support not just our work, but also work at the international level. You'll also stay informed by getting our regular email announcements and will continue to get this magazine. Thanks for your support!

Rezultoj de la 7-a Usona Bona Film-Festivalo

La 7-a Usona Bona Film-Festivalo konkludiĝis! Inter kvin jaroj, la tuta kvanto de filmoj nun nombras pli ol ducent, kun pli ol dek du horoj. Unuavice, dankojn al la kvin ĵurianoj, kiuj taksis la 47 filmojn ricevitajn ĉi-jare: Peggy DOLTER, Kartero WILLIAMS, Preston FIRESTONE, Quintyn BOBB, kaj Lua HALL. Gratulojn kaj laŭrojn al la dek gajnintaj filmoj:

10. Traktato
9. La Paseo
8. Ses Kordoj
7. Gastiganto
6. La Trafikecirklo
5. La Vera Vi
4. Longe Vivu La Reĝino
3. DOMARO
2. Bona Esperanto por la Ĉiutaga Vivo!
1. Malbonŝanca Kulero

Filmoj 4-10 gajnis po 200 dolarojn. La tria premiita gajnis 600 \$, la dua 800 \$, kaj la unua 1200 \$.

Aldone, pro la malavara subteno de sponsoroj de la Film-Festivalo ĉi-jare, dek Honoraj Mencioj ricevos po cent-dolaran premion:

- Trokompreno
- Zumanta Jes
- Saluton, Belulino!
- La Pordo Inter Ni
- Saluton, Mi Estas Komencanto
- SOS
- Kiel Plaĉas Al Vi
- Pardono
- Konfesu
- La Solvo Al Ĉiuj Viaj Problemoj

Fine, estas ne nur unu, sed du Elektro de la Spektantaro, kiuj ricevos ducent-dolaran premion, denove danke al sponsora subteno. Ambaŭ filmoj ricevis pli ol sepcent ŝatojn en Jutubo:

- Nur Objekto
- La Kolibro

La ĉefa sponsoro estis Ana.so, kaj la Film-Festivalo ricevis kroman donacon en la nomo de Charles POWER post lia forpaso en la printempo. Sen iliaj kontribuoj, la Film-Festivalo ne povus nutri tiel talentajn reĝisorojn, aktorojn kaj kunlaborantojn, kies verkoj riĉigas la esperantan kinon — kordankon al ili!

Kaj dankon al ĉiuj, kiuj partoprenis la Usonan Bonan Film-Festivalon kaj kontribuis al la filmaro de Esperantujo. Ĉiujn filmojn oni povas spekti ĉe la oficiala Jutub-konto de Esperanto-USA, inkluzive de du kromaj filmoj submetitaj post la limdato; jen la plena 7-a Usona Bona Film-Festivalo: <mallonge.net/UE-2025-UBFF>



UEA invitas prelegi en IKU 2026 en Graco, Aŭstrio

La konata astrofizikisto Amri WANDEL, ĉefa motoro de la scienca agado de UEA, komunikis al la Estraro de UEA sian decidon rezigni pri sekretariado de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) – tamen li restos membro de la IKU-komisiono. La nova estraro transdonis tiun taskon al José Antonio VERGARA, iama estrarano pri scienca kaj faka agado. Ĉilia medicinisto, li jam delonge membras en la IKU-komisiono kaj mem prelegis kelkfoje en IKU. Laŭ la bona etoso de la plurjara kunlaboro inter prof. Wandel kaj d-ro Vergara, la nova IKU-sekretario profitos de la konsiloj kaj helpo de prof. Wandel, kiel jam interkonsentite inter ambaŭ.

La 79-a IKU-sesio okazos kadre de la 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Graco (Graz), Aŭstrio. UEA invitas proponojn por IKU-prelegoj, kiujn oni sendu al la IKU-sekretario retpoŝte per iku@uea.org, plej laste la 31-an de Januaro 2026. Estante jam kvazaŭ tradicio, ankaŭ ĉi-kongrese okazos lige al IKU studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj Scienca Kafejo (SK). Tiu lasta programero konsistas el mallongaj (ĉ. duonhoraj) prelegoj, eventuale pli konversaciaj ol kutima universitata lekcio. Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu

IKU-prelego, kune kun 1-2 kromaj prelegoj kaj eventuale ekzameno. Bonvolu indiki, ĉu via propono estu konsiderata nur por IKU, por IKU kaj eventuale AIS-kurso aŭ nur por SK.

La proponoj estu fakecaj, tamen taŭgaj por pli vasta, klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto, sume duonpaĝon.

Aparte estas bonvenaj proponoj de personoj, kiuj ne jam aŭ malofte prelegis en IKU. La proponojn prijuĝos la IKU-komisiono laŭ objektivaj kriterioj. Kvankam la nombro da IKU-prelegoj estas necese limigita, SK estos tute trafa scenejo por prelegoj ekster tiu areo. Ĉiu ĉeesta preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo al la UK ĉe uk.esperanto.net.

Akceptita IKU-prelego, IKU-AIS-kurso kaj SK-prelego estos rekompencita per honorario. Tamen duono el la honorario estos pagata nur se la teksto estos liverata de la preleganto ĝustatempe por kompilado de la IKU-libro. Pliaj detaloj kaj resumoj de antaŭaj prelegoj troviĝas en la retejo de IKU: uea.org/kongresoj/universitato. La IKU-regularo troveblas per la ligilo uea.org/teko/regularoj/iku_regularo.

Aĉetebblas ĉe la Libroservo de UEA la papera IKU-libro 2025 kiel same IKU-libroj de antaŭaj jaroj. Ĉiuj estas bonvenaj akiri tiujn valorajn verkojn kaj aliĝi al la 111-a UK: uk.esperanto.net.

Nekrologoj

Jim Henry

omaĝoj • Brandon SOWERS

Mi unue renkontis Jim HENRY en 2003, kiam, freŝbakite, mi alvenis al mia unua Esperanto-arango, de la Esperanto-Societo de Metropola Atlanto, kiun li helpis fondi en 1997. Li ankaŭ estis triono de la kongresa komitato por la ELNA-kongreso en Atlanto en 2000, pri kio vi povas legi interesan raporton en [UE 2000:3](#).

Mia plej forta memoro de tiu epoko estas, ke li proponis porti min al la trajnstacidomo de MARTA, kaj mi diris “gratulon”, pro influo de la hispana, anstataŭ “dankon”; li estis tre ĝentila pri la eraro.

Mi foriris de Atlanto en 2006, kaj revenis en 2014. Intertempe, Jim translokiĝis al Norda Karolino por esti pli proksime al la hospitalo de la universitato Duke, kie li ricevis prizorgadon pri lia mukoviskozeco, kiun li suferis denaske. En Majo de 2015 li ricevis duoblan pulmtransplanton, do, li pluvivis dek jarojn post tio. Post sia translokiĝo, li ankoraŭ foje vizitis Atlanton, kaj ni ĉiam tre ĝojis kiam li venis.



En postaj jaroj, kiam mi komencis pli ofte esplori en la arĥivo de nia bulteno, mi trovis, ke Jim estis ofta kontribuanto, ekzemple dum la mezaj 2000-aj jaroj, kiam li estis membro de la estraro. Kaj kiam en 2021 mi legis la romanon *A Handbook of Volapuk*, mi ĝuis trovi lian recenzon en UE 2006:3-4 kaj lian intervjuon kun la aŭtoro

en la sekva numero (ankaŭ legeblan sur la retejo de la aŭtoro).

Jim Henry estas bona ekzemplo de esperoplena samideano, kies senĉesaj kontribuoj dum multaj jaroj helpis al nia movado en Usono en multaj diversaj manieroj. Ripozu en paco, amiko!

John Dale

omaĝoj • Izako ZAVIRUĤA, John Henry DALE

Kun pezaj koroj ni anoncas ke John DALE forpasis. amegata patro, avo kaj tre ŝatata membro de la bahaa kaj Esperanto-komunumoj de la regiono de Portlando.

Naskiĝinta je la 7a de decembro 1946 en Evanston, Ilinojso, John kreskis en Cincinnati, Ohio, kaj studis ĉe Lake Forest College por sia bakalaŭro en filozofio, poste studis ĉe la Washington Kolegio de Juro de American University. Post jurfakultato li iĝis advokato por enmigrintoj en Vaŝingtono, DK, kaj Norda Virginio, kie li laboris por politikaj petantoj de aziloj, rifuĝintoj kaj reformo de la UN.


Kiel eksa prezidanto de la Nacia Esperanto-Societo, li estis avida kaj flua parolanto kaj verkisto en Esperanto, kiu dum jardekoj laboris por antaŭenigi ĝian uzon kaj akcepton en la usona eduka sistemo kaj ĉe la Unuiĝintaj Nacioj. La vivvojaĝo de John finiĝis la 15an de oktobro 2025. Li lasis heredaĵon de vasta filozofia, spirita kaj scienca esplorado, advokataro por enmigrintoj en Usono kaj tutmonde, kaj neforviŝeblan markon de afableco kaj scivolemo en ĉiuj, kiuj havis la privilegion koni lin.

Postvivigante lin estis sia filino Kendra Dale kaj ŝia filo Maxwell Carmichael, sia filo John Henry Dale kaj lia filino Isabella Dale-Wang, kaj siaj du spiritaj infanoj, Mila Aldrin kaj Constantine Aldrin. Ankaŭ postvivigas lin lia sindona partnerino kaj kunserĉanto, Lorraine Karol, kun kiu li dividis profundan, ameman ligan en siaj lastaj jaroj kaj momentoj. John havis neestingeblan soifon je scio, montritan per lia vasta biblioteko, kiu staris kiel atesto de lia dumviva sindevontigo fari profundajn kaj signifoplenajn demandojn pri vivo, la universo kaj ĉio.

La profunda scivolemo de John etendiĝis preter la mondo ĉirkaŭ li. Li estis same fascinita de la vasteco de la kosmo, montrante nesatigeblan deziron kompreni la universon kaj ĝiajn misterojn. Li ankaŭ faris rimarkindajn kontribuojn al Esperanto, spegulante sian profundan kredon je universala kamaradeco kaj kompreno.

Konata pro sia empatia naturo, John traktis ĉiujn kun digno kaj respekto. Lia sincera kredo je kontinua edukado kaj traktado de aliaj kun bonkoreco fariĝis la instruoj, kiujn li transdonis al pli junaj generacioj. Ĉi tiuj valoroj, kaj lia sindono al universalistaj principoj, konsistigas parton de lia daŭra heredaĵo.

Fronte al sia fina malsano, la spirito de John restis nevenkita. Lia sindono al legado kaj lernado restis firma, kaj donas al li senton de celo kaj plenumo ĝis la fino. En fina konversacio kun sia filo, John Henry, John diris, ke lia plej granda deziro por la homaro estas, ke ni lernu fariĝi memregantaj estaĵoj, kiuj nature agas laŭ manieroj plej utilaj por la tuta monda komunumo. La foresto de lia fizika ĉeesto estos profunde se vintata, sed la influo de John daŭros en la vivoj, kiujn li tuŝis, kaj pere de memorlibro, muziko kaj medi-biblioteko. Lia memoro inspiras ĉiujn vivi vivon plenan je scivolemo, bonkoreco, konscio kaj konstruado de tutmonda komunumo.



~~~~~  
Karaj amikoj,

Jen la filo de John Dale, John Henry Dale. Mi skribas de la Facebook-konto de mia patro kun kelkaj malĝojaj novaĵoj.

Mia patro, John Therrien Dale Jr, forpasis merkrede, la 15-an de Oktobro, ĉirkaŭ tagmezo laŭ la pacifika tempo. Li estis pace, ĉirkaŭita de amo. Mi havis tion, kion mi kredas estis lia lasta duonklara konversacio kun li lunde, kie li dividis siajn lastajn dezirojn por siaj funebro kaj memorfesto, kaj por la pli bona mondo, kiun li esperis manifesti per sia laboro kaj per siaj posteuloj. Mi diris al li kion mi amas lin kaj ke mi faros mian plejebulon por daŭrigi la laboron, kiun li faris. Mi tenis lian manon forte kaj li premis ĝin kun surpriza forto kaj varmeco dum ni parolis.

Kiel kelkaj el vi scios, li batalis kontraŭ milda prostatkancero dum kelkaj jaroj kaj sukcesis teni ĝin for dum preskaŭ sep jaroj. Sed ŝajnas, ke ĝi plimalboniĝis antaŭ ĉirkaŭ unu jaro kaj li fariĝis nekapabla marŝi kaj moviĝi memstare ĉirkaŭ Februaro. Tiam ni pensis, ke li havas *eble* 2-3 monatojn restantajn, sed ŝajne per pura

forto de volo kaj amo li daŭrigis dum pliaj ok monatoj! Ĉi tio estis vera beno, ĉar ĝi donis al ni ĉiuj la ŝancon havi multajn profundajn, signifoplenajn, amajn konversaciojn pri la vivo, la universo kaj ĉio kun li. Ĝis la fino li konservis esperon kaj forton, kaj mi eterne fieros pri kiel li alfrontis ĉi tiun timigan batalon kontraŭ tia kruela malsano.

Liaj lastaj deziroj, kiujn li transdonis al mi, kiam mi demandis al li, kion li plej volas vidi okazi en ĉi tiu mondo, estis, ke ni ĉiuj trovu la kapablon evolui preter la paradigmo de ekstera registaro, kiu uzas la minacon de perforto kaj forto por kontroli homojn, kaj ke ni ĉiuj fariĝu memregantaj estaĵoj, kiuj nature agas laŭ manieroj, kiuj plej profitigos nian tutmondan kolektivan komunumon.

Se vi konus John T Dale Jr, ĉi tiuj lastaj deziroj verŝajne tute ne surprizas. Lia plej granda deziro en ĉi tiu mondo estis vidi ĉi tiun mondon trovi pacon kaj harmonion per tutmonda komunumkonstruado, muziko, scienco, filozofio, amo, kaj laboro kaj interna kaj ekstera. Mi faros mian plejebulon dum la resto de mia propra vivo por honori liajn vivajn kaj mortantajn dezirojn. Li estis mia Patro Maximo Grande. Ripozu en la kosmo, Patro. Ni amas vin.



---

## Sally Lawton

### anoncoj

Sally Muther Lawton of 12 Stage Road Westhampton for the past 63 years passed away peacefully on Sunday, October 12, 2025. After attending late afternoon services and a community supper at the Unitarian Universalist Society of Northampton and Florence, she appeared to “go to sleep” in the back seat of her friends’ car on the ride home to Westhampton. CPR was attempted by EMT services and later at Cooley Dickinson Hospital, but to no avail. Sally was 99-1/2 years old, born in Boston, MA on March 28th, 1926, to Marion Hyde Muther and Walter P. Muther. She was predeceased by her husband Ed Lawton, and her eldest son, Larry Nielson (born Edward Lawton). She leaves behind her daughter Cynthia Lawton-Singer of Conway, Massachusetts, and her son James Lawton of Windham, Maine along with their spouses Alan Singer and Liz Slott-Lawton respectively and grand-daughter Kelsea Singer of Turner’s Falls, Massachusetts. She was the last living member of her generation of a large extended family of Muthers, and a cousin by marriage to the Hathaways of Vermont and Connecticut. In addition to these family members, Sally leaves behind countless friends she made through the years in her many wide-ranging endeavors.

Sally Lawton’s early years, marked by the turbulence of the Great Depression, were lived in a nomadic fashion. She moved with her mother Marion, a concert pianist, and her father Walter, an MIT engineer and WWI pilot, every two years between 1926 and 1947. She lived in Cambridge, Wellesley, Sherburne, Scituate, Cohasset, Norwell (Massachusetts) on to Dayton Ohio (where she graduated from high school) and then San Bernadino, Oakland (where she attended and graduated in 1947 from Mills College) and Mill Valley, California. Constantly being “the new kid” in schools made social life difficult for Sally during these years and she became adept at self-entertainment.

Sally developed several very strong interests at a young age that she continued to enjoy pursuing throughout her life. Her perceptive, inquisitive, and highly creative nature was encouraged by like-minded parents. Sally was a voracious reader, a fine painter and a crafter who explored drawing, painting, pottery, origami, botany, flower arranging, sewing, batik dyeing, silk-screen printing, biochar making, language skills and science. In the later years of her life, her interest in science turned and focused on climate change and solutions to it.

In 1950, after college and WWII, the Muther family moved back to the East coast. There Sally attended Harvard Summer School in 1951 where she met Ed Lawton at a July 4th dance. They married six weeks later in August 1951.

Sally and Ed Lawton became members in 1955 of the Unitarian Universalist Society of Northampton and Florence. The Society provided Sally and her family a place to support their unconventional ideas and aspirations born of the study of science, religion, the sacred and the profane. Sally created amazing, unusual flower arrangements every Sunday for decades, was Director of the Religious Education Program for several years and a soprano in the church choir. She was responsible also for landscaping the front and sunny side of the church property as well as maintaining house plants inside the church in the social hall.

While in high school, Sally read an article in a book titled "Childbirth Without Fear". This inspired a passionate forty-year effort to learn about (and demonstrate) the critical importance of women's reproductive health. She became a fierce proponent of natural childbirth and breast-feeding beginning in the 1950s. After her first birth, done with general anesthesia, Sally chose to change doctors and had her next two children using natural childbirth techniques. Her third child, James, was born at home in 1960. In the early 1970's, Sally was a strong advocate for birth control, the availability of legalized, safe abortion and for reproductive health rights for women. She wrote numerous letters "To the Editor" and to public officials, and attended meetings and assisted women getting abortions when necessary. Sally designed and produced silk-screened posters announcing natural childbirth, breast-feeding classes and public forums for discussion of women's reproductive rights.

Sally was strongly devoted to her family. In the late 1950s her mother began to develop dementia. In 1962 the Muthers and Lawtons combined households, purchasing and moving to the house at 12 Stage Road. Marion and Walter lived there with their daughter's family all the remaining days of their lives. The Lawton family also frequently visited Ed's elderly relatives in South Dartmouth, Massachusetts. Sally had a natural interest in children. Sharing and teaching made motherhood natural and enjoyable for her. Projects in clay, cutting paper snowflakes, hearts, drawing, painting, and pastels were common activities as well as enjoying delicious and healthy home-cooked meals. Sally was an early adopter and proponent of healthy eating.

At home in Westhampton she made gardens, starting with vegetable gardens made in joint effort with Walter. Soon she was taking advantage of having a permanent home, planting all manner of trees, shrubs, and perennials which she would then glean for flower arrangements for Sunday morning services at the UU or use for still-life subjects in a painting. In 1981 Sally and Ed had a sunroom added to their home. This quickly became a greenhouse with two chairs for enjoying lunch in the sun for the aging Ed, Walter and Sally. The greenhouse provided years of horticultural experiments, wonder and delight. This greenhouse joy continued to the day of Sally's death.

Although she was a fierce advocate of education and earned her Master of Education from the University of Massachusetts in the early 1970s, she found teaching art in the public schools during the early 1970s to be a joyless enterprise. Sally instead turned her time and attention to shepherding her three teenagers through that turbulent era. During her life, Sally taught art, language, cooking, craft-making, and religious education in numerous venues: public schools, at her beloved UUSNF, in public libraries, at the Castilleja School in Oakland, CA and Williston Academy. Sally belonged to several groups of artists who joined together to draw from live models over the years. She exhibited her paintings and other artworks in many public venues.



In early mid-life, the Lawton family had lived in Tokyo, Japan for a year. There, Sally taught English-speaking to Japanese businessmen. She added some Japanese language skills to her repertoire of languages with which she had familiarity (Latin, French, Spanish, German, Russian). Upon returning to the USA in 1967, the Vietnam War was ramping up. Sally had already lived through WWII and the Korean War. She began looking for solutions to mankind's propensity to solve differences and problems through aggression and violence. Believing that if we could all meet on neutral ground with a common language, native to no one, that people could communicate more productively and avoid settling things with bloodshed. She began a decades-long engagement with the man-made language of Esperanto; Sally attended Esperanto Congresses in Brazil, Mexico, Canada, Eastern Europe, as well as numerous US locations. She then taught Esperanto in the public schools in Westhampton as a volunteer, believing exposure to language for American children was an educational essential.

As Sally entered the final decade of her life, she experienced an eye-stroke that reduced her sight and two years later, at 92, liver cancer from which she miraculously recovered 100% without recurrence. Her activities grew closer to home as she quit driving at 97. True to her indomitable self, she used this as an opportunity to focus and read extensively on her last passionate concern: how to reverse climate change and regenerate the earth. Anyone who encountered Sally in a conversation will remember being told about her latest book. Teaching us some of the interesting ideas it contained for solving our destructive land use, agricultural practices, over-consumption, energy production, and social inequality. She also loved reading Houdini's biography, Ruth Simmons' autobiography, *Up Home: One Girl's Journey* and *Grandma Gatewood's Walk*. She would read and re-read to digest every bit of what the author had to offer and then share that with anyone who visited her. Sally never stopped learning, teaching, and living her life to the fullest. Not even for one day.

---

## Estrar-kunsidoj, Aŭg-Okt

de la estraro

Por konservi spacon, la bulteno inkluzivas nur la protokol-resumon. Plenaj protokoloj (inkluzive de diskutoj) estas haveblaj ĉe la ĉefretejo de E-USA. <[esperanto-usa.org/en/category/meeting-minutes/](http://esperanto-usa.org/en/category/meeting-minutes/)>

---

### August 2025

**Proposal:** To accept the [gift acceptance policy](#). Unanime aprobita.

**Proposal:** Ke la estraro aprobu priskribon de la posteno de niaj redaktoroj de *Usona Esperantisto*. Unanime aprobita.

**Proposal:** Ke la estraro aprobu [tiun ĉi ĝisdatigitan politikon pri konduto ĉe sociaj retejoj](#). Unanime aprobita.

### September 2025

No Board votes.

### October 2025

**Proposal:** To establish a **Junulara Komitato (Youth Committee)** consisting of: Enrique Haro, Madeleine Canavese, Rachel Canavese, N. Carter Williams, Quintyn Bobb, Vince Allison, Shneur Agronin, Kasja Walker, and Kinen Carvala. Committee will focus on organizing resources for US youth, events, and community-building, with international cooperation as a secondary objective. Motion approved unanimously.

# 2025 K3 Financa ĝisdatigo

de la kasisto • Matt Brooks

En la tria kvaronjaro (K3), Esperanto-USA trankvile plifortigis sian financon stabilecon kaj samtempe antaŭenigis plurajn longtempajn celojn. La rakonto de K3 estas pri disciplino: zorgema mastrumado de elspezoj, sukcesaj donackolektoj, kaj modesta kresko de investoj kondukis nin al komforta superfluo kaj pli forta likvideco.

La operacia aktiveco donis pozitivan rezulton, ĉefe dank' al granda limigita donaco, konstanta membreca kaj donaca subteno, kaj daŭra sukceso de la libroservo. Grave, ĉi tiu progreso okazis sen surprizi novan ŝuldon, kio montras nian engaĝiĝon al respondeca administrado de la membraj rimedoj.

## Saldoj de kontoj

| Konto        | Fino de K2 (30 Jun) | Fino de K3 (30 Sep) | Ŝanĝo      |
|--------------|---------------------|---------------------|------------|
| Ĉekkonto     | 54 504 \$           | 96 544 \$           | +42 040 \$ |
| Kreditkarto* | (2 391 \$)          | (68 \$)             | +2 323 \$  |

\*La kreditkarta saldo montras la kvanton ŝuldatan al la banko. La malaltiĝo ĝis 68 \$ montras, ke preskaŭ ĉiuj ŝuldoj estis pagitaj antaŭ la fino de la kvaronjaro.


## Investoj

| Konto                         | Fino de K2        | Fino de K3        | Ŝanĝo             |
|-------------------------------|-------------------|-------------------|-------------------|
| Fondusoj                      | 283 839 \$        | 289 527 \$        | +5 688 \$         |
| Nelimigitaj investoj          | 273 319 \$        | 286 707 \$        | +13 389 \$        |
| <b>Sumo (kontoj de E-USA)</b> | <b>557 158 \$</b> | <b>576 234 \$</b> | <b>+19 077 \$</b> |

La kresko spegulas kombinaĵon de favora merkata rendimento kaj profesia administrado pro nia nova partnereco kun *Morgan Stanley*. Ankaŭ la *Reed Trust*, kiun Esperanto-USA administras sed ne posedas, kreskis (proksimume 18 765 \$ ≈ 4,5 %) kaj plenumis la antaŭe planitajn distribuadojn por edukaj programoj en 2027.


**Noto:** Memoru, ke de 2024 ni planas la uzadon de investaj rendimentoj, inkluzive de la *Reed Trust*, dum la buĝeta procedo por la sekvanta jaro.

**Noto:** La subaj bildoj enhavas anglajn priskribojn ĉar ili venas el nia financsistemo kiel neredakteblaj bildoj.



## Elstaraj punktoj de K3

Esperanto-USA atingis disciplinan, kontantpozitivan kvaronjaran rezulton. Niaj kontantaj rezervoj pliiĝis, kaj investoj plivaloriĝis sen grandaj elfluoj. Kernaj administraj kostoj — salajroj, lupagoj kaj teknologio — restis proksimaj al la plano. La kresko de enspezoj devenis ĉefe de la 55 000 \$ en limigitaj donacoj kaj daŭraj kontribuoj de membroj.



La Dulanda Kongreso kun la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) estis finance sukcesa. Ĉar KEA gastigis la eventon, Esperanto-USA registris nur la netan efikon en niaj libroj — malgrandan sed pozitivan saldon devenintan el libroservo-vendoj kaj repago de vendimposto. La aferon ni planis tiel, ke la buĝeto restu ekvilibra je la fino, kaj la modesta superfluo subtenos estontajn programojn.

## Libroservo – fokuso de K3

La vendoj ĉe la libroservo restis stabilaj kaj enspezaj, kun kvaronjara vendosumo de ĉirkaŭ 1 091 \$ (341 \$ pli ol planite), subtenitaj de donacita stoko, kio malaltigas la koston de venditaj varoj. Esperanto-USA daŭre ricevas librodonaĵojn, kiuj fortigos estontajn rezultojn, kaj la organizaĵo esploras novajn varojn por vendi per *LaBazaro.com*, esperantuja retbutiko.

## Planitaj agoj de la kasisto

- Daŭrigi kunlaboron kun *Morgan Stanley* por optimumigi la investan rendimenton.
- Labori kun la profesia kontisto por modernigi la kontoplanon laŭ nuntempaj neprofitcelaj normoj, por pli simpla buĝetado, dumjara financa spurado kaj jara impostpreparo.
- Komenci la buĝetadon por 2026, utiligante la lernitaĵojn el la ĉi-jara plena modelo.

## Rigardante antaŭen

La estraro prilaboras iniciatojn por vastigi la programaron en 2026. La ideoj inkluzivas: aldoni partatempan kaj kontraktan subtenon por ĉefaj programoj kaj por la Landa Kongreso, lanĉi subvencipetan programon, kaj restartigi la fakon pri eldonado por krei novajn oportunojn por enspezoj. Ni ankaŭ planas dezajni varojn por vendo per *LaBazaro.com*, por membroj kiuj volas plie subteni la mision.

Dank' al la fido kaj daŭra malavareco de la komunumo, Esperanto-USA restas finance fortika kaj preta investi en novajn manierojn por plifortigi la Esperanto-movadon en Usono.

# Esplorante la lingvon de financoj, parto 4

## De buĝetsekcioj ĝis financaj etatoj

de la kasisto • Matt Brooks

En partoj 1–3 ni prezentis bazajn terminojn kaj dialogojn, kiuj montris, kiel ni uzas financajn fakvortojn por administri nian neprofitcelan organizaĵon. Ĉi-foje ni plonĝos en la strukturon de buĝeto kaj du kernajn raportojn: la Etaton de Financa Pozicio kaj la Etaton de Financaj Agadoj. La celo estas klarigi tiujn konceptojn tiel simple kiel bone redaktita buĝetfolio. Venu!

### Kio konsistigas “bonan” buĝeton?

Buĝeto estas **rakonto pri la estonteco**: ĝi ne nur montras, kiom ni intencas elspezi, sed ankaŭ **kial**. Tial efikaj buĝetoj havas tri klarajn sekciojn:

| Sekcio                      | Celo                                          | Ekzemplaj linieroj                           |
|-----------------------------|-----------------------------------------------|----------------------------------------------|
| <b>Programoj</b>            | Rektaj kostoj por plenumi la organizan mision | NASK-stipendioj, kongresoj, retaj kursoj     |
| <b>Administrataj kostoj</b> | Subtenaj kostoj por funkciigi la servojn      | Salajroj, oficeja lupago, ĝeneralaj utilaĵoj |
| <b>Monkolekto</b>           | Investoj por akiri estontajn enspezojn        | Donackampanjoj, butik-renovigoj              |

Per ĉi tiuj sekcioj, la buĝeto klare montras **kiel ĉiu dolaro subtenas la mision kaj kiom kostas akiri la venontajn dolarojn**.

### Programaj kontraŭ administrataj kostoj

Neprofitcelaj organizaĵoj ofte baraktas inter tro da administrado kaj tro malmulte da infrastrukturo. Por bone regi la organizon kaj kompetente plenumi la mision, la estraro kaj direktoro de la Centra Oficejo devas demandi al si, kiel ekvilibrigi la kostojn kiuj apartenas al:

1. **Programoj**: la rektaj agadoj, pri kiuj la donacanto pensas kiam ri subtenas nin.
2. **Operacioj**: la iloj, kiuj tenas tiujn agadojn funkciantaj.

**Bona regulo**: Ni devas rigardi ĉiun fakturon kaj demandi al ni, “Ĉu ĉi tio rekte profitigas la ricevantojn de nia servo?”

- Se jes → programa elspezo
- Se ne → administra kosto

Tiu klara distingo kreskigas la fidon de donacantoj, kiuj komprenas ke administrataj kostoj estas necesaj, sed ne estu troaj.

### Etato de Financa Pozicio

La **Etato de Financa Pozicio** prezentas *momentfoton* de la organizaĵo:

- **Aktivoj**: ĉio, kion ni posedas aŭ rajtas ricevi.
- **Pasivoj**: ĉio, kion ni devas pagi.
- **Netaj aktivoj**: la diferenco, subdividita en **limigitajn kaj nelimitajn**.

Se la Etato de Financa Pozicio montras sanan netan pozicion, tio donas al estraranoj kaj donacantoj trankvilon: ni ne elspezas pli ol ni havas. Krome, oni povas determini ĉu la organizo kreskas tra tempo pere de la sumo de aktivoj kiel kontanto kaj la sumo de konservita mono. Eĉ la sumo de ankoraŭ ne pagitaj salajroj povas indiki, ke la organizo kreskas per pli granda stabo ... kaj tiu linio troviĝas inter la pasivoj.

### Etato de Financaj Agadoj

La **Etato de Financaj Agadoj** montras kiom da mono eniris kaj kiom da mono eliris la organizon dum specifa periodo (kutime monate, kvaronjare aŭ jare):

- **Enspezoj** laŭ fonto (kotizoj, donacoj, renta enspezo, vendadoj).
- **Elspezoj** klasifikitaj laŭ la tri buĝetaj sekcioj supre.
- **Neta Profito aŭ Perdo:** la rezulto de enspezoj kaj elspezoj.

Kun klarigaj notoj, ĉi tia etato rakontas cifere: kion ni planis, kion ni efektive faris, kaj kio restas por atingi.

## Resumo

Buĝeto ne estas nur tabelo; ĝi estas **rakonto pri respondeco kaj vizio**. Kiam buĝetsekcioj, EFP kaj EFA prezentas ciferojn klare kaj trariveble, membroj povas kompreni la tutan bildon. Gravegas, ke la estraro kaj direktoro de la Centra Oficejo preparu ampleksan buĝeton ĉiujare por montri kaj la progreson de la misio kaj, ke la organizo mem povas atingi siajn celojn. Kiel ĉiam, se vi havas ajnajn demandojn aŭ proponojn rilate al la financoj de Esperanto-USA aŭ rilate al ĉi tiu serio, bonvolu sendi al mi retpoŝtan mesaĝon!

## Novaj fakvortoj en ĉi tiu parto

| Esperanto                        | Angla ekvivalento       | Mallonga klarigo                                 |
|----------------------------------|-------------------------|--------------------------------------------------|
| <b>Etato de Financa Pozicio</b>  | Balance Sheet           | Momentfoton de aktivoj, ŝuldoj kaj netaj aktivoj |
| <b>Etato de Financaj Agadoj</b>  | Income Statement / P&L  | Raporto pri enspezoj, elspezoj kaj netŝanĝo      |
| <b>Aktivoj</b>                   | Assets                  | Ĉio, kion ni posedas aŭ rajtas ricevi            |
| <b>Pasivoj</b>                   | Liabilities             | Ĉio, kion ni devas pagi                          |
| <b>Limigitaj netaj aktivoj</b>   | Restricted Net Assets   | Segmentoj ligitaj al specifaj celoj              |
| <b>Nelimigitaj netaj aktivoj</b> | Unrestricted Net Assets | Segmentoj sen specifaj limigoj                   |
| <b>Renta enspezo</b>             | Investment Income       | Interesoj kaj dividendoj el investita kapitalo   |
| <b>Monkolekta sekcio</b>         | Fundraising Section     | Buĝeta kategorio por akiro de estontaj enspezoj  |

## Solvo: *Senteme* el № 2025:3

### enigmo-solvoj

Dankon kaj laŭrojn al Rafa NOGUERAS, kiu duan sinsekvan fojon submetis la solan ĝustan solvon al la redakcio. Li ricevas la dek-dolaran retbutik-rabaton!

---

|    |    |    |    |    |    |   |    |    |
|----|----|----|----|----|----|---|----|----|
|    |    |    | 1  | 2  | 3  | 4 | 5  | 6  |
|    |    |    | A  | B  | I  | S | M  | O  |
| 7  | 8  | 9  | P  | A  | L  | P | I  | S  |
| 10 | A  | P  | A  | R  | T  | A | A  | R  |
| 11 | K  | A  | P  | O  | E  | J | R  |    |
| 12 | E  | L  | O  |    |    |   | 13 | 14 |
|    |    | 16 | 17 | 18 | 19 | K | U  | 15 |
|    |    | P  | A  | R  | K  | E | J  | O  |
| 20 | 21 | E  | L  | E  | M  | E | N  | T  |
| 22 | Ĉ  | I  | R  | E  | G  | I | O  | N  |
| 23 | A  | P  | O  | G  | A  | D |    |    |

# Krucvortenigmoj

enigmoj • Kartero WILLIAMS

Jen du novaj krucvortenigmoj je 7×7 danke al Kartero WILLIAMS! Inter la solvintoj ni lotumos rabaton de la retbutiko — po 5 \$ por enigmo. La redakcio akceptas solvojn ĝis **20 Februaro, 2026** al la adreso [bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org). Domaĝe, ni ne plu provizas la enigmon per reta versio ĉe *AmuseLabs* pro ŝanĝo de ties ofertoj, rilate prezon kaj agordeblecon.


## S-s-s-serpente

### Horizontale

1. Senvaloras
5. Ŝerce dirite, \_\_\_\_\_ pensite
6. Sonas kanjone
9. Negliĝ'
10. Marionet'
12. Preseraro zamenhofa
14. Cuname
15. Regn'

### Vertikale

1. Kanada arb'
2. Anton, kies pafilo devas pafiĝi
3. Pruv' pri neĉeesto
4. Taburet'
7. Restmon'
8. Senorela
11. Hom' kiel Dinwoodie
13. Manuj'




## Po tri fojojn jare

### Horizontale

1. Cerved'
5. Rebat'
7. Sendevigan
8. Eĉ monstren admiras, kiu \_\_\_\_\_ deliras
9. Brian Moon de la Akademio de Esperanto
10. Subskribint' de kontrakto
12. Senmakulig'
13. Semajno por lerni Esperanton

### Vertikale

1. \*Literatura
2. Ŝultr-al-ŝultr
3. \*Periodaĵ'
4. Kial' ne manĝi pomsemojn
5. Rilatan al cigano
6. Nod', koncerne rapidon
7. Laf' de lafolampo
11. Barack Obama rilate al la prezidento de Usono



# Bildstrioj

## *La vivo de Peĉjo*

Ĝercoj • Timothy BORONCZYK



## *Kaĉo sen ĉapelo*

Ĝercoj • Izako ZAVIRUĤA



# NOREK ege sukcesis en sia 44-a jaro

kongresaj raportoj • Izako ZAVIRUĤA

La Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco (NOREK) malfermis sian 44-an jaron je la 22-a de Aŭgusto per bonvena vespermanĝo ĉe *Chill N Fill Bar and Food Carts* en Portlando, Oregono.

En Portlando, manĝaĵkamionoj estas grava parto de la loka kulturo. Kvankam tia fenomeno ne limiĝas al la urbo, la granda diverseco de kuirartaĵoj disponeblaj en unu loko estas konsiderata kiel karakterizaĵo de la portlanda vivo. Tiaj aranĝoj ebligas al partoprenantoj ĝui diversan elekton de manĝaĵoj, kio aparte taŭgas por grandaj grupoj kun malsamaj preferoj.

Bedaŭrinde, tiu semajnfino montriĝis la plej varma de la jaro en Portlando, kun temperaturoj ĝis preskaŭ 104°F (40°C). Tamen, tio ne malhelpis esperantistojn el la nordokcidento de Usono kaj okcidenta Kanado ĉeesti. Pli ol dudek partoprenantoj kunvenis en la kelo de la Aŭgustana Luterana Preĝejo sabate por aŭskulti prelegojn en Esperanto, partopreni en trezorĉasado kaj interparoli kun samlingvanoj.

Prelegoj pri diversaj temoj estis prezentitaj de John DALE, Ŝeri WELLS, Aŭtuno TAFOYA, Alejna WARFIELD, Reĝo REMIGIO, Nikvo WOODS, kaj la prezidanto de Esperanto-USA, Brandon SOWERS.

Poste, ni vespermanĝis ĉe *McMenamin's Broadway Pub*, ŝatata loka restoracio en Portlando.

Dimanĉe, la lastan tagon de la konferenco, estis planitaj du ekskursoj. La unua devis esti ŝanĝita lastmomente, kiam oni malkovris, ke la Sabata Bazaro (kiu dum la lastaj jaroj okazis kaj sabate kaj dimanĉe) ŝanĝis siajn horojn. Anstataŭe, la partoprenantoj renkontiĝis ĉe la fama portlanda institucio *Voodoo Doughnut*, konata pro siaj nekutimaj kaj kreemaj benjetoj, ekzemple unu el acerkremono kaj lardo. Poste, ni ĝuis la aĉetitajn benjetojn en *Tom McCall Waterfront Park* apud la rivero *Willamette*.

Poste, la grupo vizitis la konatan librejon *Powell's City of Books*, kiu okupas tutan urboblokon. Post libroliumado, la ĉeestantoj ĝisis unu la alian.

Dum tri tagoj preskaŭ tridek esperantistoj de ĉiuj aĝoj kaj lingvoniveleoj kunvenis por ĝui la internacian lingvon kaj la komunumon, kiun ĝi nutras. Resume, la konferenco sukcesis daŭrigi preskaŭ kvar-kaj-duonan dekjaran tradicion. Ĝis venontjare!



## Frato

senintenca esperantaĵo • Jeremy GENOVESE



*Frato Bros Waste Systems* estas rubkolekta firmao en Klevlando, Ohio konsistanta el la fratoj Frato — Joe FRATO, Andrew FRATO, Anthony FRATO kaj Pasquale FRATO.

# Mikronoveloj

## *Revelacio*

Timothy BORONCZYK

Ĉiuj taksis ŝin tro fantaziema. Kompreneble, neniuj povas antaŭvidi la estontecon! Sed Karlinjo ja povis. Kaj pro tio, ŝi ofte suferis ŝercojn kaj mokadon.

Veturante hejmen de skiada ferio, Karlinjon kaj ŝian familion trafis furioza neĝoŝtormo. La monta vojo fariĝis glitiga, kaj ĉio ekstera malaperis pro kirla vento kaj grandaj neĝeroj.

“Mi timas,” ploris ŝia juna frateto.

“Ne maltrankviliĝu,” diris la patro, stirante la aŭton. “Se ni estus mortontaj, Karlinjo dirus al ni.”

Karlinjo serĉis revelacion, kaj vidante nur malplenon, ŝi paliĝis. “Mi vidas nigran nenion,” ŝi avertis.

“Ho! Post tiom da tempo, nun viaj kapabloj misfunkcias!” ridis ŝia patro.



## *Tempovojaĝado*

Debra HAMEL



“Ne eblas ŝanĝi la pasintecon. Mi devas elporti la vivon, kiel ĝi estas. Kaj dank’ al vi” — ŝi ekrigardas la terapiiston sidantan kontraŭe — “mi konscias, kiel fuŝa ĝi estas.”

“Vi travivis multon.” La frazo portas la pezon de ĉio, pri kio ili jam parolis.

“Mi vojaĝus reen en tempo por ripari aferojn sed verŝajne tretus vermon kaj kaŭzus amasan formorton. Krome, ne eblas tempovojaĝi.”

“Ja eblas,” li diras. “Ĉiuj tempovojaĝas.” Kiel kutime, lia esprimo rivelas nenion sed aludas multon.

Survoje hejmen, ŝi haltas laŭ kaprico ĉe bestorifuĝejo, kiun ŝi preterveturas semajne. Hodiaŭ fariĝos hieraŭ: eble morgaŭ ŝi estos akirinta katon.

## Kolofono

*Usona Esperantisto* estas la oficiala bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu proksimume 200–2000 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte kun via nomo, adreso kaj memfoto. Kun aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevatajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Opinioj esprimataj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de la redakcio aŭ de Esperanto-USA.

Sendu kontribuojn al [bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org).

Materialoj aperintaj en *Usona Esperantisto* estas libere haveblaj kaj redisdoneblaj laŭ la permesilo CC BY-SA 4.0. Ni tamen petas, ke legantoj atendu du monatojn antaŭ ol reeldoni la plej freŝajn artikolojn.

La limdato por artikoloj en № 2026:1 estas la **15-a de Februaro, 2026**. Sendante materialon al la redakcio, oni donas al Esperanto-USA neekskluzivan permeson redakti kaj aperigi la materialon en la bulteno kaj en aliaj eldonaĵoj. Aŭtoroj tamen retenas kopirajton kaj tial rajtas reuzi, reeldoni, aŭ vendi siajn originalajn, neredaktitajn verkojn laŭplaĉe, sen bezono atribui ilin al *Usona Esperantisto*.

**Redakcia teamo:** Alena ADLER kaj Lua HALL.

## Aŭtoroj

### Matt Brooks


Mateo BROOKS ekstudis Esperanton en 2017 kaj pasie verkas poezion, kiun li lastatempe adaptas al kantoj per artefaritaj intelektoj kiel Suno. Li parolas kvar lingvojn kaj studas multajn aliajn per platformoj kiel Duolingo. Kun pli ol dek jaroj da sperto en estraroj de neprofitcelaj organizaĵoj kaj pli ol dudek jaroj en financaj kaj teknologiaj postenoj ĉe grandaj firmaoj, li kontribuas kiel Kasisto de E-USA per vasta scio kaj sperto. Liaj literaturaj verkoj haveblas ĉe [blog.brooksny.net](http://blog.brooksny.net).

<[matt.brooks@esperanto-usa.org](mailto:matt.brooks@esperanto-usa.org)>

### Timothy BORONCZYK

Timoteo esperantistiĝis en 2011. Li estas estro de la Esperanto-Societo de Sirakuso (Nov-Jorkio), kaj profesie laboras kiel programisto.

<[tboronczyk@gmail.com](mailto:tboronczyk@gmail.com)>



### Izako ZAVIRUĤA

Izako estas unu el la gvidantoj de la Esperanto-Societo de Portlando kaj helpis organizi la eventon NOREK en 2025. Li ankaŭ estas estrarano de Esperanto-USA. Li loĝas en Portlando, Oregono kun sia partnero kaj kato, kiu (laŭ ŝi) estas la reĝino de la mondo.




### Debra HAMEL

Debra estas verkisto de pluraj libroj pri antikva Grekujo (en la angla). Ŝi loĝas en Konektikuto, Usono.



### Krome kontribuis:

Brandon SOWERS • John Henry DALE • Kartero WILLIAMS • Jeremy GENOVESE



Fotinto: Elle BECK